

TEA-BULTENO

1^a JARO

JULIO 1998

NUMERO 6



AGENDO



- 1 M
- 2 Ĵ
- 3 V Antaŭferia festo: Bonvenon, Somero!
- 4 S
- 5 D
- 6 L
- 7 M IEK' 98 - LABOROJ
- 8 M
- 9 Ĵ
- 10 V IEK' 98 - LABOROJ
- 11 S
- 12 D
- 13 L
- 14 M IEK' 98 - LABOROJ
- 15 M
- 16 Ĵ
- 17 V IEK' 98 - LABOROJ
- 18 S
- 19 D
- 20 L
- 21 M
- 22 M
- 23 Ĵ
- 24 V
- 25 S
- 26 D
- 27 L
- 28 M Pretigo de TEA-BULTENO
- 29 M
- 30 Ĵ
- 31 V Komentoj pri OSIEK-Konferenco



Internacia Esperanto-Konferenco
IEK '98 - 18-24 julio
 Ekskursoj: 25-26-27

Konferencejo:
Club Eurostar
 en la Centra Stacidomo

La brilega suno, la sennuba blua ĉielo, la refreŝiga maro invitas nin nur al ĝuado de ĉemara nenifarado. Ja eksplodis somero: nun estas tempo por feriado, por sterniĝi kiel lacertoj sur varma sablo, por oksigeni niajn urbanajn pulmojn en montaraj arbaroj. Jes,

la plej bela periodo de la tuta jaro atendas nin helpe al malstreĉigo de nia tute eluzita nervo-sistemo.

Ni flankemetu por kelka tempo la rutinaĵojn kaj dediĉu nin nur al distraĵoj. Kaj inter tiuj ĉi lastaj, kial ni ne ludetu iom per nia bela lingvo, samtempe lernante kiel fleksebla kaj manipulebla ĝi estas.

Pristudu la ĉi-sube skribitajn kunmetaĵojn, klopodante malkovri por ĉiu el ili la plej taŭgan kaj bonstilan tradukon. Post ĉiu vorto estas aldonita ties disdivido en la apartaj eroj, kun klarigo de la signifo en la itala.

ĉiutageco = ĉiu+tag+ec+o (*ogni/giorno/qualità/desinenza sostantivo*)

Ne zorgu pri la mizeraĵoj de l' ĉiutageco.

bekkapti = bek+kapt+i (*becco/catturare*)

La aglo bekkaptis la kompatindan birdeton.

eltrovemo = el+trov+em+o (*fuori/trovare/inclinazione/des. sost.*)

Lia imagriĉa eltrovemo ĉiam surprizas min.

finforĝi = fin+forĝ+i (*finire/forgiare/des. verb.*)

Antaŭ la eldonado, la poeto finforĝis sian verkaĵon.

alzumado = al+zum+ad+o (*a/brusire/in continuità/des. sost.*)

Ĝenis ŝin la ĉeorele senĉesa alzumado de la klaĉantoj.

amflustre = am+flustr+e (*amore/sussurrare/des. avv.*)

Ne kredu liajn, amflustre diritajn, mensogojn!

diseriĝi = dis+er+ig+i (*divisione/elemento/diventare/des. verb.*)

Por plena venko, nepras ne diseriĝi.

vespiro = ve+spir+o (*esclamazione di infelicità/respirare/des. sost.*)

Ŝia korŝira vespiro altiris la atenton de la amato.

samĉambranino = sam+ĉambr+an+in+o (*stesso/camera/appartenenza/genere femminile/des. sost.*)

Tro frue vekigis mia samĉambranino!

dikventrulo = dik+ventr+ul+o (*grosso/ventre/individuo/des. sost.*)

Tiu dikventrulo manĝegas pli ol elefanto.

Ĉu plaĉis al vi ĉi ekzercado? Espereble ke jes. Tamen dum via intertempa amuziĝado, ne forgesu ke por ni tri-stanoj somero komenciĝos iom pli malfrue, ĉar ĝis la fino de julio ni intense laborados por inde prepari la INTERNACIAN ESPERANTO-KONFERENCON (18-25.07). Ĉu ankaŭ vi estos inter ni por helpi kaj bone aranĝi, por ke niaj gastoj pasigu kiel eble plej agrablan periodon ĉe ni?

KIA ANGLA?

Por konsciiĝi pri la pluraj facetoj de la lingva problemoj, ne nur Esperanto-gazetojn konsilindas trafolumi. Abundas nuntempe tiu temo en revuoj, ĵurnaloj, ktp kaj preskaŭ ĉiutage eblas trovi tiajn referencojn.

Sur la kulturpaĝo de loka ĵurnalo, do, tujtuje altiris mian atenton la titolo: *Autostop, footing, spider: ecco il nostro inglese inesistente* (Autostop, footing, spider: jen nia nekzistanta angla). En la artikolo detale alireblas pluraj ekzemploj de falsa angla, kiuj ŝajne tre oftas en la hodiaŭa itala lingvo. Por la italoj, kiuj ĉiam emis al fremdaj vortoj, enŝovi anglan esprimon en la paroladon estas kvazaŭa manifestado de internacieco, de pli rafinita kulturo, aŭ pli vere, de komplezo al la plupova povo, kiu probable devenas de la pereco de la romia imperio. Sed ofte, ili stumbas sur tiuj vortoj, kiuj - asertas la aŭtoro - eĉ anglaformaj, «estus nekompreneblaj TransManike».

La liston malfermas malĝustaj ortografiaj variantoj de vere anglaj vortoj aŭ esprimoj: interalie *windsurf* (veltabulo), kiu angle estas *windsurfer* aŭ *surf board* - la ilo - kaj *windsurfing* aŭ *surf riding* - la sporto. Krome, *happy end* (feliĉa fino), kiu angle respondas al *happy ending*.

Ĉar multaj pseŭdoanglaj vortoj en la italan eniris el la franca, okazis tiel la alpreno de tiaj misaĵoj tra tiu lingvo. Laŭ *smoking*, kiu, itale kaj france, signifas «vespera kostumo», brito komprenos nur «fumo» aŭ «fumi»: fakte, tiu aparta vesto angle nomiĝas *dinner jacket* kaj usone *tuxedo*.

Footing estas «apogpunkto» kaj nepre ne «kurado» aŭ «lantkurado» (vd. ITALA-ESPERANTO VORTARO de Minnaja), kiujn difinas la angla vorto *jogging*.

Box (skatolo) havas por la italoj ankaŭ la signifon de «aŭtoremizo» aŭ «garaĝo», kiuj angle esprimiĝas per la vorto... *garage*, dum la alian koncepton, en la itala, de «bebokaĝo» britoj indikas per *plapen*.

La vorto *water* entenas angle nur la sencon de «akvo», kun amaso da kunmetitaj esprimoj, interalie *water closet* (necesejo) sed la «klozetseĝo», kiun italoj nomas ankaŭ *water*, estas en la angla *toilet bowl*.

Tre interese, la vorto *carter* uziĝas itale por indiki kaj la «ĉenŝirmilon» de biciklo kaj la «oleokuvon» de motoro: akcentindas ke la koncernaj anglaj terminoj estas respektive *chain guard* kaj *oil sump*, esprimoj tute similaj al la Esperanto-vortoj. Kaj la ekzakta signifo de *carter* en la angla? «Ĉarkondukisto»!

Same spicas la vorto *spider* (araneo) en la angla: tra kiu stranga vojo tiu vorto gajnis en la itala la signifon de «duloka sporta aŭtomobilo» - angle *two-seater*? Eble el iu speco de malnova kvarrada kaleŝo nomita *spider phaeton*.

Hibrida vorto estas *autostop*, simile veninta el Francio: fakte, ĝin angla vortaro ne entenas, ĉar tiu veturmannero esprimiĝas angle per *hitch-hiking*, kiu, laŭvorte, signifas «veturi saltoskue, ekskue, intermite!» Ĉu ne pli klara la simpla Esperanto-vorto «petveturi»?

Vere mirigaj estas la rilatoj - tiuj klaraj kaj tiuj kaŝitaj - inter la lingvoj. Amaso da «falsaj amikoj», da pseŭdo-vortoj - krom la reguloj kaj esceptoj - baras kompren-

iĝon inter diverslingvanoj, sen paroli pri la kostoj - mono kaj tempo - de la lernado.


En la artikolo la aŭtoro asertas, ke «la angla antonomazie estas la internacia lingvo». Plie estas komuna opinio, ke sufiĉus scipopovo de tiu etna lingvo, eĉ se supraĵa. Sed tiamaniere, interŝanĝo de pensoj kaj ideoj, dialogo inter malsamlingvanoj, ĉiam pasos, devige, tra la diverseco de kulturoj, la baroj estigitaj de malsamaj historiaj spertoj kaj la strangaj rilatoj inter la lingvoj.

Ĉu vere, tute ne eblas interkompreniĝo? La solvo estas komuna lingvo, NEPRE neŭtrala. Esperanto.



El Ret-info:

RUMANIO - Ekde la 24^a de majo trafikas laŭ la fervoja linio Bukureŝto-Sibiu trajno n-ro 1622, kies baptonomo estas ESPERANTO.



Ni konkurencu kun la Piedpilka MondĈampionado!

Serioza alvoko de JoMo (Jean-Marc Leclercq) al esperantistaj futbalistoj. Dum la UK en Montpellier li intencas organizi matĉon kontraŭ teamo de okcitanistoj: do, en viaj valizoj, enmetu vian ekipaĵon por piedpilka ludado kaj jam nun trejnu vin por esperantista venko sur stadia tereno. Tuj kontaktu JoMon - ret-adreso: jlecl@aol.com -




Iom da ciferoj - La revuo ESPERANTO denove superis la limon de 5000 legantoj: en 1997 ĝin ricevis 5003 samideanoj el 115 landoj. Rekorda kresko ankaŭ por KONTAKTO, la soci-kultura revuo de TEJO, kiu nun havas 2050 legantojn.



KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Vigle korespondadas dum la tuta jaro kaj tra la tuta mondo la esperantistaro, danke ankaŭ al KSM-ekzistado. En 1997 ĝi ricevis 550 petojn el 59 landoj: la plej multaj venis el Francio (102), Rusio (77), Madagaskaro (59), Brazilo (57) kaj Pollando (40). Konsilindas, ĉefe al instruistoj kaj al kluboj, uzadi ĉi tiun vere efikan ilon kaj i.a. diskonigi ĝin inter lernantaro. Interesatoj sin turnu al la prizorganto: s-ro Francois Xavier Gilbert - KSM - B.P. 6 - FR-55000 Longeville en Barrois.



Al TEA-anoj! Ĉu vi havas dubojn rilate al via pago de ĉi-jara asocia kotizo? La kasisto estas ĉiam je via dispono por malaperigi vian necertecon, ĉiun mardon kaj vendredon ekde la 20^a ĝis la 22^a h. Memoru ke por plua vivado kaj plua agado de TEA tre gravas via mon-subteno!

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128; reto: nored@iol.it
Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro
Poŝtĉekkonto N° 10834349